

Eŭropa Bulteno

Julio/aŭgusto 2018, Numero 183

PUBLIKA KONSULTO PRI LINGVOJ EN EŬROPA UNIO

La ombudsmano de EU publikigis la konsulton pri lingvoj en EU kies limdato estas fino de septembro. Estas invitataj ĉiuj civitanoj de Eŭropa Unio prezenti siajn opiniojn plenumante enketilon kun 19 demandoj. En la tempo de nova pripensado de la lingva demando post briteliro tio estas grava ebleco atentigi pri la eblecoj kiujn por EU povas signifi Esperanto. Tial ni aliĝas al invito al esperantistoj kiun prezentis UEA laŭeble amase respondi al tiuj demandoj. Faru tion kluboj, asocioj kaj individuoj kaj informu pri tio ĉiujn kiuj volus kunpartopreni. Oni povas respondi en kiu ajn el 24 lingvoj de EU (ne en Esperanto). Jen ĉi-sube la tuta teksto dissendita de UEA.

Publika konsulto

La uzo de lingvoj en EU-institucioj, instancoj, oficejoj kaj agentejoj

Invito sendi komentojn

La ombudsmano ŝatus instigi al diskuto pri la demando kiel la institucioj de EU plej bone komuniku kun la publiko laŭ maniero, kiu reflektas akcepteblan ekvilibron inter la bezono de respekto kaj subteno por lingva diverseco, unuflanke kaj administraj kaj buĝetaj limigoj aliflanke.

Por lanĉi ĉi tiun diskuton, la ombudsmano invitas al la publiko respondi al la sekvaj demandoj:

Estas 19 demandoj en ĉi tiu enketo.

En sia aliro al ĉi tiu demandaro, UEA emfazas:

- (1) ke ĉiuj civitanoj de EU ricevu informojn en lingvo, kiun ili regas, precipe pri la kernaj vivbezonoj – tio kion Zamenhof nomis “la doma vivo de la popoloj”;*
- (2) ke la kostoj ne falu misproportie sur la ŝtatojn kaj civitanojn kun malpli grandaj/malpli vaste parolataj lingvoj;*
- (3) ke lingvopoltiko estu eksplicita kaj publika, kaj do alirebla por publika kontrolo kaj kritiko;*
- (4) ke Esperanto estas necesa elemento de justa lingvopoltiko por la civitanoj de EU.*

Niaj rekomendoj estas kompreneble nur sugestoj. Ni bonvenigas pli vastan diskuton pri ĉi tiuj demandoj, kaj instigas niajn membrojn adapti siajn respondojn konforme al siaj propraj spertoj kaj konvinkoj.

Ni kore dankas al nia membro Johan Derks pro lia esperantigo de la enketilo. Pri la ĉi-subaj sugestoj li tamen ne respondecas.

I. Reguloj kaj praktikoj pri lingvaj limigoj

1. Ekzistas manko je travidebleco (kaj malmultaj formalaj reguloj) pri tio kiel la malsamaj sekcioj de la EU-administracio disponigas informojn en la diversaj oficialaj lingvoj de EU. Ĉi tio inkluzivas, ekzemple, la kriteriojn uzatajn por decidi kiu(j)n lingvo(j)n oni uzu en apartaj kunteksto. Kiel trakti ĉi tiujn malplenojn? Kiuj kromaj kriterioj, se iu ajn, devus aplikiĝi?

UEA rekomendas:

- a. Estu pli da travidebleco pri lingvopolitiko en ĉiuj branĉoj de EU;*
- b. Leĝoj kaj reguloj de EU, kiuj tuŝas “la doman vivon de la popoloj” (ekz. pri sano, edukado, socia asekuro kaj prizorgo, civitanaj rajtoj) estu ĉiam disponeblaj en ĉiuj oficialaj lingvoj;*
- c. Iniciatoj kun gravaj financaj sekvoj por la civitanoj, kiel anoncoj pri laborpostenoj, gvidlinioj pri grandaj subvenciprogramoj kiel Erasmus+, kaj la disponigo de publika mono, estu komunikataj en pluraj lingvoj laŭ klaraj gvidlinioj;*
- d. Estu iu minimuma nivelo de plurlingveco kiu aplikiĝas al ĉiuj branĉoj de EU.*

2. Ĉu ĉiu EU-institucio havu propran lingvan politikon kaj, se tiel, kio devus esti inkludita en ĝi? Ĉu tiaj lingvaj politikoj devas esti publikigitaj en la retejoj de la institucioj? Kiom detala devus esti tia politiko rilate al specifaj kazoj, en kiuj la elekto de lingvo(j) estas limigita?

UEA rekomendas:

Ĉiu instanco de EU havu eksplicitan, publikan lingvopolitikon kiun oni povas konsulti kaj pri kiu oni povas komenti en ties retejo.

3. Ĉu ĉiu institucio havu politikon pri la kondiĉoj sub kiuj ĝi povas provizi tradukojn de informoj aŭ dokumentoj laŭ peto? Se tiel, kiel tiu politiko povas esti enkadrigita por eviti senproportiajn kostojn?

UEA rekomendas:

Estu laŭeble vasta rajto peti tradukojn de informoj kaj dokumentoj de EU, precipe kiam tiuj havas longtempan validon (unu jaron aŭ pli).

II. EU-retejoj

4. Kiaj ĝeneralaj lingvaj principoj devas aplikiĝi al retejoj de EU-institucioj? Kiuj specifaj partoj de EU-retejoj, laŭ via opinio, devus esti disponeblaj en ĉiuj aŭ multaj EU-lingvoj?

UEA rekomendas:

- a. Ĉiuj retejoj, kiuj celas vastan/ĝeneralan eŭropan publikon (“Eŭropon de la civitanoj”), devas esti multlingvaj, laŭeble en ĉiuj EU-lingvoj;*
- b. Ĉiuj retejoj, kiuj donas aliron al monfontoj por civitanaj iniciatoj, studado/edukado, sanprogramoj ktp, estu multlingvaj, laŭeble en ĉiuj EU-lingvoj;*

c. *En retejoj kun malpli da lingvoj, kaj sekve kun pli da lingva diskriminacio, oni konsideru la enkondukon de Esperanto kiel aldonan neŭtralan lingvon.*

5. Ĉu estus helpe havi resumojn pri ŝlosilaj aferoj eldonataj en ĉiuj aŭ multaj oficialaj lingvoj?

UEA rekomendas:

Resumoj en ĉiuj aŭ multaj oficialaj lingvoj estu haveblaj por ĉiuj gravaj dokumentoj. Kiam ajn oni donas tian resumon, oni aldone provizu resumon en Esperanto.

6. Ĉu akcepteblas en iuj cirkonstancoj provizi materialon en malgranda nombro da lingvoj prefere ol en ĉiuj oficialaj lingvoj? Se tiel, kiaj kriterioj devus esti elektitaj (ekzemple, grandeco de la parolantaro de la koncerna lingvo, grado de lingva diverseco en la populacio ...)?

UEA rekomendas:

Tio estas akceptebla nur kiam temas pri informoj kaj dokumentoj por specialistoj/profesiuloj kaj ne por la ĝenerala publiko.

III. Publikaj konsultoj

7. En aprilo 2017a, la Eŭropa Komisiono adoptis novajn internajn regulojn, kiuj postulas ke dokumentoj rilate al publikaj konsultoj pri la prioritataj iniciatoj en la jara Labora Programo de la Komisiono estu publikigitaj en ĉiuj oficialaj lingvoj de EU. Ĉiuj aliaj publikaj konsultoj bezonas disponiĝon almenaŭ en la angla, franca kaj germana. Publikaj konsultoj havantaj "larĝan publikan intereson" devus esti disponeblaj en pluaj lingvoj.

Krome "konsultaj paĝoj aŭ ilia resumeo devas esti tradukitaj en ĉiuj oficialaj lingvoj".

Ĉu ĉi tiu politiko, laŭ via opinio, trafas la ĝustan ekvilibron inter la neceso respekti kaj subteni lingvan diversecon, unuflanke kaj administrajn kaj buĝetajn limigojn, aliflanke? Ĉu ĉi tiu tipo de politiko povus juste egale esti adoptita de aliaj EU-institucioj?

UEA rekomendas:

- a. *La ekskluziva uzado de la angla, franca kaj germana por publikaj konsultoj ne montras adekvatan respekton al la lingva diverseco de EU.*
- b. *La difinoj de "vasta publika intereso" kaj "pliaj lingvoj" estas tro nebula.*
- c. *Tiu ĉi aliro al la lingva politiko de EU estas malproksime de la koncepto de "Eŭropo de la civitanoj" kaj devas esti funde reprovizita.*

IV. Aliaj

8. La sola specifa leĝaro pri uzado de lingvoj en la EU-administrado datumas de 1958 kiam estis ses membroŝtatoj kaj kvar oficialaj lingvoj. Ĉu vi opinias, ke en la nunaj cirkonstancoj, nova leĝaro estus helpema? Aŭ ĉu vi opinias, ke traktado de lingvaj aferoj estas plej bone farata ekster detala jura kadro?

UEA rekomendas:

- a. *Nova leĝaro estos helpa, nur se ĝi plifortigos la garantiojn al la EU-civitanoj, ke ili rajtas je informoj kaj subteno pri esencaj homaj bezonoj kaj la demokratia mastrumado de ilia socio en lingvo, kiun ili regas.*
- b. *Sendepende de la jura demando, tiuj garantioj bezonas plifortigon per la enkonduko de formala lingvopoltiko en ĉiuj branĉoj de EU.*

9. Ajna pliigo de la volumo de informoj kaj dokumentoj publikigataj en ĉiuj EU-lingvoj implicos aldonajn tradukajn kostojn. Kiel vi sugestas, ke ĉi tiuj aldonaj kostoj povos esti kovritaj? Aliloke en la EU-buĝeto? Per asignado de aldona financado de la individuaj Membro-Ŝtatoj implikitaj? Per aliaj rimedoj?

UEA rekomendas:

Tradukkostoj estu pagataj el la ĝenerala buĝeto. Se la lingvopolitiko de EU favoras difinitajn lingvojn (ekz. la anglan, francan kaj germanan), la landoj kie tiuj lingvoj estas oficialaj principe pagu iom pli por kompensi tiun avantaĝon.

10. Ĝis kioma grado teknologio povas aplikiĝi por provizi tradukaĵojn inter la diversaj EU-lingvoj? Konsiderante, ke "maŝinaj" tradukoj eble ne ĉiam estas precizaj, ĉu tio estas akceptebla prezo pagenda, ĉar dokumentoj fariĝas disponeblaj en traduko pli rapide kaj ekonomike ol estus la kazo alie?

UEA rekomendas:

- a. Maŝina tradukado povas helpi interkompreniĝon trans lingvaj baroj kaj tial estas subtenenda.*
- b. Por kompensi la mankojn kaj limigojn de maŝina tradukado, EU akompanu ĝin per oficiala subteno de Esperanto kiel neŭtrala lingvo de la civitanoj.*

Se vi volas alŝuti pluan dokumentadon, bonvolu uzi ĉi tiun kampon.

Bonvolu alŝuti maksimume 20 dosierojn.

Kontakt-informoj

Titolo, Nomo, Organizo:

Retpoŝto:

Loĝlando:

Lingvo de la kontribuo:

Alia lingvo, en kiu vi konsentas ricevi komunikadojn:

UEA rekomendas listigi Esperanton ĉi tie.

Kategorio:

UEA rekomendas ke vi respondu kiel individua civitano. Kompreneble landa aŭ faka asocio povas ankaŭ respondi kiel "NRO aŭ asocio".

Via respondo povas esti publikigita kun via propra informo (personaj retpoŝtadreso ne estas publikigataj). Povas esti publikigita en sennoma maniero.

Bonvolu konscii, ke dokumentoj en posedo ĉe la Eŭropa Ombudsmano laŭrajte povas esti malkaŝitaj plene aŭ parte depende de la koncerna decido de Ombudsmano

<https://www.ombudsman.europa.eu/en/atyourservice/publicaccess.faces>

REKOMENDOJ DE LA PREZIDANTO DE EEU POR RESPONDOJ AL LA PUBLIKA KONSULTO

1. Ne sufiĉas plu trakti lingvopolitikon ekskluzive je nacia nivelo; urĝe necesas interregistara konferenco por difini tuteŭropan lingvopolitikon bazitan sur la valoroj de la Eŭropa Ĉarto.
2. Ni substreku ke, se EU komunikas kun kelkaj civitanoj en la propra denaska lingvo, kaj ne faras tion kun aliaj, tio estas klara diskriminacio. Ni insistu pri tio.
3. Ni skribu ke, se EU opinias ke tio estos tro multekosta, EU devus proponi formalan interregistaran konferencon por konsideri la aferon, ĉar efektive temas pri ege grava afero. La slovaka vice-ĉefministro Dusan Caplovic jam proponis tian konferencon en 2007, sed la tiama EU-Komisiono tute ne komprenis pri kio temas, kaj eĉ ne respondis al la letero de la vice-ĉefministro (multaj ministroj en EU fakte respondis, kaj pluraj respondis favore al la konferenco). Homoj ĝenerale subtaksas la gravecon de lingvopolitiko, ĉar ili ne komprenas ke toleri lingvan diskriminacion, aŭ iun ajn diskriminacion, povus damaĝi la tutan koncepton de eŭropa integriĝo, kaj certe estos uzata kontraŭ EU fare de la ekstremaj naciistoj kaj kontraŭuloj de eŭropa integriĝo.
4. Mencii la raporton de la ekonomiisto, profesoro Francois Grin de 2005, kiu kalkulis ke la internacia dominado de la angla alportas financan transferon de inter €17 kaj €18 miliardoj jare. La raporto Grin rekomendis konsideron de rolo por Esperanto (kiu povus ŝpari €25 miliardojn jare al EU), sed ankaŭ tute realisme agnoskis ke EU ne donos rolon al Esperanto, ne pro iu manko en la lingvo, sed pro la fortegaj antaŭjuĝoj de influhavaj sekcioj de la eŭropa loĝantaro, antaŭjuĝoj kiuj baziĝas je granda nescio pri Esperanto, kaj forta volo nenion ekscii pri ĝi. Grin proponis ke endus publika kampanjo en ĉiuj EU-membroŝtatoj dum tuta generacio por forigi tiujn antaŭjuĝojn. Sed gravas mencii la ekonomian dimension, ĉar multaj EU-oficistoj komprenas nur la ekonomian flankon, kaj forgesas ke eŭropa integriĝo tuŝas civitanojn, kaj ne nur konsumantojn.
5. Ni substreku la gravecon alproksimigi la eŭropan integriĝon al la civitanoj. Limigi la lingvojn uzatajn fare de EU riskus fari la kontraŭon. Civitanoj kiuj devus legi pri EU nur en fremda lingvo, konsciantaj ke aliaj rajtas legi pri EU ĉiam en la denaska lingvo, emus perdi intereson al eŭropa integriĝo, kaj eĉ ekkontraŭi ĝin, kiam ili vidas ke ĉiama lingva diskriminacio fariĝis parto de ĝi.
6. EU ne forgesu pri la 50 miliojn parolantoj de ne-shataj lingvoj en la EU-landaro: la kataluna, la euska, la galega, la bretona, la kimra, la skotgaela, la frisa, kaj multaj aliaj.
7. EU ne forgesu pri la lingvoj de enmigrintoj, kiel la turka, la araba, la ĉina, ktp.
8. Sed la plej grava afero estas ke ni ĉiuj reagu! Por kontraŭi tiun strebon iom kaŝi antaŭenigi la anglan. Ni povas reagi, en la propra lingvo, je
<https://www.ombudsman.europa.eu/de/correspondence/nl/99005%3Bjsessionid%3D8A58D63435169F76A05C4E02E68DBE22>

Resume pensu pri jeno:

1. lingva justeco en EU kaj la EU-landoj
2. plifortigi eŭropan identecon
3. pliproksimigi la civitanojn al la eŭropa integriĝo
4. endas samrajtigi la parolantojn de lingvoj de malplimultoj en EU-landoj
5. endas samrajtigi la parolantojn de lingvoj de enmigrintaj en EU-landoj
6. interregistara konferenco en EU; konsideri ĉiujn eblajn solvojn, ankaŭ eblan rolon por Esperanto
7. la graveco de multlingvismo kaj de lingva diverseco

8. kiam EU-retejo por specialistoj estas nur en la grandaj lingvoj, EU, FR kaj DE, oni konsideru aldoni version en neutrala lingvo kiel Esperanto

Seán Ó Riain

KUNSIDO DE ASEMBLEO DE EEU DUM LA 103-A UK EN LISBONO 2018 (FERMITA KUNSIDO 29.07.2018)



Estis 18 asocioj kiuj pagis sian kotizon 2017. El ili 10 partoprenis la ĝeneralan kunsidon. Antaŭ la kongreso ĉiuj assembleanoj ricevis kompletan raporton pri la financoj kaj ankaŭ la raporton de la revizoro.

Laŭ tiu raporto estas necesa plia maniero por altigi la enspezojn de la asocio. La subvencioj far la Eŭropa Komisiono ne estas stabilaj enspezoj. Ni feliĉe ricevis financon apogon por kelkaj projektoj sed nur pro ardega laboro de nia projektodirektoro Maja Tišljar. Fakte estas pli da rifuzitaj projektoj ol tiuj kiuj estas akceptitaj. Sed bedaŭrinde la laboro por enkonduki la projektojn restas egala ankaŭ por tiuj rifuzitaj.

Nur per strikta kontrolo de la financoj ni povas elteni sanan staton de la financoj. Ni bedaŭras ke ne ĉiuj membroj de EEU komprenas tiun problemon kiu estas la kerno de niaj agadoj favore al ESPERANTO.

Ni do alvokas la membrojn de EEU al konsidero de la grava devo finance subteni nian asocion per regula pago de la jara kotizo.

La ĉeestantoj faris kelkajn demandojn pri financado kaj pagado al la partneroj de la EU-projektoj. La respondoj kontentigis ilin.

Flory WITDOECKT
vicprezidantino kaj kasistino de EEU

PUBLIKA KUNVENO DE EEU KAJ UK-KONGRESANOJ EN LISBONO



La publika kunveno de EEU okazis lundon, la 30an de julio. Proksimume 80 homoj ĉeestis, kaj la diskuto daŭris dum horo kaj duono. Jozef Reinwart laŭtlegis parton de la raporto de sekretario Zlatko Tisljar pri la laboro de EEU dum 2017, kaj la laborplanon por 2018. Ambasadoro Ulrich Brandenburg ne povis ĉeesti, pro samtempa kunsido de la Komitato de UEA, sed li ĉeestis kaj grave kontribuis al la fermita kunveno de EEU la 29-an de junio.

Seán Ó Riain unue honorigis la sekretario de EEU, Zlatko Tišljár. Estis la unua fojo ke Zlatko ne povis mem ĉeesti publikan EEU-kunvenon, pro grava sanproblemo. Ĉiuj deziris rapidan resaniĝon al li. Seán alparolis la kunvenon dum duonhoro pri la por-esperanta laboro en la EU-landoj, kaj raportis pri kontaktoj kun gravaj EU-politikistoj. Li forte substrekis du ecojn: lingvan justecon, kaj la programon Multlingva Akcelilo.

Li klarigis ke la angla restas oficiala lingvo de EU post la Briteliro la 29an de marto 2019, ĉar unuvoĉa decido de la Konsilio de EU estus bezonata por forigi ĝin, kaj tio estus politike neebla. La situacio povus doni kaj negativajn kaj pozitivajn sekvojn. Negativa: post la Briteliro la angla estos nedenskata lingvo por 99% de EU-civitanoj - nur 5 milionoj da irlandanoj kaj kelkmil homoj en Malto parolos ĝin denaske. Pro tio, oni povus konsideri ĝin preskaŭ neŭtrala lingvo - neniuj timas ke 1% povus trudi sian povon al la tuta EU. Pozitiva: se lingvo nedenskata por 99% de la civitanoj povas glate funkcii, lingvo kiel Esperanto kiu estus nedenskata por 100% de la civitanoj, kaj do vere neŭtrala, povus ankaŭ glate funkcii. Estas fakto ke multe pli da homoj diskutadas pri la uzo de lingvoj en EU ekde la britelira referendumo la 23an de junio 2016.

Seán forte substrekis la gravecon de la programo Multlingva Akcelilo, kaj mallonge klarigis pri kio temas. Li altiris atenton al unu noviga aspekto de la programo - ke ne-esperantistaj instruistoj povos uzi la didaktikan materialon kiun ĝi produktas. Li informis pri la invito al EU-Komisionano pri Kulturo kaj Eduko, Tibor Navracsics, paroli pri la programo dum la EEUa komuna kongreso kun la italaj Esperantistoj en Triesto fine de aŭgusto 2019.

Poste Seán raportis pri kontaktoj kun EU-Komisionano D-ro Vytenis Andriukaitis, kiu daŭre kaj efike subtenas Esperanton en EU. Liaj paroladoj pri Esperanto legeblas en la oficialaj retpaĝoj de la Eŭropa Komisiono. Li kontrastis tion kun la Komisionano de 2007, kiu eĉ rifuzis respondi al letero de la slovaka vic-ĉefministro Dusan Caplovic, kiu jam tiam proponis interregistaran konferencon pri la uzo de lingvoj en EU. Seán priskribis la kunvenon de Andriukaitis kun Flory, Ulrich kaj Seán decembre 2017, kiam ili prezentis diplomon de honora membreco de EEU al la Komisionano. Seán ankaŭ raportis pri la kunveno en junio 2018 de Ulrich kaj Seán en Bruselo kun la spertulo pri multlingvismo de Komisionano Tibor Navracsics, kaj pri la prezento de multaj materialoj pri lingva justeco en EU kaj Esperanto al li. Sekvas regula korespondado kun tiu spertulo.

Seán mallonge raportis pri multaj aliaj aferoj, ĉiuj el ili gravaj, kiel la poliglota kunveno en Bratislavo en majo kaj septembro 2018 - en majo 25% de la 538 ĉeestantaj poliglotoj el 56 landoj parolas Esperanton! La ĉeestantaro forte aplaudis la laboron de EEU, kaj kelkaj elkore gratulis la laborantojn, aparte Zlatko Tišljár, kiu ne ĉesis laboregi, malgraŭ la grava malsano. Li inspiras nin ĉiujn.

Flory Witdoeckt finis la kunvenon per belega kantado de la Eŭropa Himno. La ĉeestantaro kunkantis, ĉar ni antaŭe disdonis 100 ekzemplerojn de la teksto kun muziko."

Seán Ó Riain

MALFERMON DE LA 103-A UK EN LISBONO ĈEESTIS DU AMBASADOROJ

Enkadre de klopodoj pri ekstermovada agado en Slovakio ekde 2004 kaj la malfermita 101-a UK en Nitro (dum la Prezidanteco de Slovakio en la Konsilio de EU) kaj pere de antaŭkongresa informado de Oldřich Hlaváček, ambasadoro de Slovakio, pri la UK en Lisbono, li komprenis nian agadon kaj decidiĝis partopreni la solenan UK malfermon por doni respekton al nia Esperanto-movado kaj reprezenti Slovakion je tiu ĉi granda monda evento. Feliĉe li ne estis la sola ambasadoro, kiu ĉestis la UK malfermon. La dua ambasadoro estis Jacek Junosza Kisielewski, ambasadoro de Pollando kaj ankaŭ aliaj diplomatoj. Bedaŭrinda estis fakto, ke malfermon ĉeestis neniu reprezentanto de la gastiganta lando.

Ambasadoro Hlaváček alte taksis la eblecon vidi, aŭskulti kaj observi multlingvan, multkulturan kaj multreligian komunumon de Esperanto parolantoj. Li jam konscias, ke tiu ĉi komunumo prezentas, ke egalrajta, nediskriminacia kaj efika lingva komunikado eblas pere de la neŭtrala lingvo. Nia lingva komunikado estas modelo por la mondo, kiel por UNO/UNESCO, tiel ankaŭ por EU/Eŭropo, kiu bezonas solvi egalrajte kaj efike komplikajn lingvajn problemojn por sukcese antaŭenigi eŭropan integriĝon kune kun la civitanoj.



Ambasadoro Hlaváček invitis Jozef Reinart kaj Peter Baláž al Ambasadato de Slovakio por diskuti pri novigaj multlingvaj agadoj kaj projektoj en kiuj partoprenis internacia civitana organizaĵo E@I, financitaj de Eŭropa Komisiono ekde 2009, kiel ekzemple retaj projektoj por lernado de lingvoj: slovak.eu (slovaka), deutsch.info (germana), mluvtecesky.net (ĉeĥa), russky.info (rusa),

lingvo.info (pri lingvoj), lernu.net (Esperanto) kaj preparata multlingva portalo por la pola lingvo. Ni diskutis pri eblecoj aldoni la portugalan en la multlingvan portalon slovak.eu, kiu troviĝas je hejmaj retpaĝoj de Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio kaj ĉiuj diplomataj misioj de Slovakio en la mondo. Aktuale en la portalo eblas lerni la slovan lingvon en 15 lingvoj. Lastjare estis aldonita la korea lingvo.

Ili ankaŭ diskutis pri ebleco proponi al portugalaĵoj kaj Komunumo de Portugale Parolantaj Landoj (la portugala lingvo estas la 5-a monda lingvo, kiun parolas 260 milionoj da homoj, je 4 kontinentoj en 9 landoj ĝi estas oficiala lingvo) „scii-kiel“ kaj spertojn de E@I (<https://ikso.net/sk>) kreon de multlingva senpaga reta portalo por lernado de la portugala lingvo.

Ambasadoro Hlaváček promesis helpi kontakti reprezentantojn de Instituto Camoes (<http://www.instituto-camoes.pt/>) por inviti la instituton partopreni en la 1-a lingva festivalo "LingvaFest" en Bratislavo la 28-an – 29-a de septembro 2018 www.lingvafest.sk/lingvafest-2018/ okaze de la "Eŭropa Tago de Lingvoj" (26-an de septembro), kiu okazos en la Universitato de Ekonomio en Bratislava, kies ĉeforganizanto estas E@I.

Laste ni diskutis kun ambasadoro Hlaváček pri problemo de malgranda partopreno de ambasadoroj kaj diplomatoj en la solena malfermo de la 103-a UK. Li parolis kun kelkaj ambasadoroj pri la invito al la UK malfermo. Surprize kelkaj diris, ke ili volis partopreni, sed ne ricevis invitilon, kion ili bedaŭris, ekzemple ambasadoroj de Israelo, Germanio kaj aliaj.

Jozef Reinart

KONGRESO DE GERMANA ESPERANTO-ASOCIO

Preskaŭ 200 Esperanto-parolantoj kunvenis dum la pentekostaj tagoj en Zweibrücken apud la german-franca landlimo. Estis trilanda kongreso kun la partopreno de la franca, germana kaj luksemburga asocioj kaj gastoj el aliaj landoj. Necesis venki kelkajn organizajn defiojn: la altlernejo tie tre taŭgis por la eventoj de la kongreso, sed situas ekster la urbo. Prizorgi manĝojn kaj trinkaĵojn do aldoniĝis al la taskoj de la organizantoj. Sed ĉio bone finiĝis, kaj dum la konkluda kunveno eĉ aŭdiĝis laŭdo por la kvalito de la manĝoj. Partoprenis pluraj libroservoj kun oferto simila al tiu de Universala Kongreso, okazis laborkunsidoj kaj jarĉefkunvenoj de partoprenantaj asocioj, krome deko da fakaj kunsidoj kaj prelegoj kun aŭ sen rilato al la kongresa temo “Esperanto – tutmonde ligita”. Podian diskutadon kaj retan elsendon pri “Esperanto kaj interreto” organizis dum unu vespero la teamo de movada-vid.punkto, Johannes kaj Eva. Kaj la duan vesperon muzik- kaj dancgrupoj pruvis la multkulturecon de la kongresurbo Zweibrücken, sekvataj de “La Kompanoj” el Francio kun kantoj de Jacques Brel en Esperanto.



La Reinhard-Selten-aŭlo (nomita laŭ la nobelpremiito kaj esperantisto, kiu mem iam prelegis en la altlernejo de Zweibrücken) dum tri tagoj fariĝis manĝejo, movada foiro kaj ĉefa renkontiĝejo de nia esperantista komunumo. Raportis lokaj gazetoj kaj la regiona televido, salutis la kongreson la ministroprezidantino de Rejnlando-Palatinato, la aganta urbestro de Zweibrücken, la urbestro de ĝia ĝemelurbo Boulogne-sur-Mer (bone konata al esperantistoj) kaj la prezidanto de la altlernejo, kiu mem partoprenis en la malfermo. Salutmesaĝoj venis ankaŭ de Margaret Zaleski-Zamenhof kaj de la UEA-prezidanto Mark Fettes.

Kadre de la kongresa temo ni diskutis kiel rilatigi nian propran tutmondecon – evidentan por esperantistoj jam dum 130 jaroj – kun la tutmondiĝo, kiun hodiaŭ ofertas la interreto kaj sur ĝia bazo aro da modernaj komunikiloj. Neniam estis pli facile informiĝi pri Esperanto (kaj pri ĉio alia), neniam pli facile eklerni nian lingvon (same kiel aliajn). En sia prelego Chuck Smith (kunfondinto de la Esperanto-Vikipedio, la Esperanta versio de la interreta kurso Duolingo kaj de la reta ligilo Amikumu) raportis pri la progreso de Esperanto en la reto. Li ankaŭ donis ekzemplojn, kiel el la reto povas fariĝi komunumo, kiu reale kunvenas kaj organiziĝas. Interesa aspekto: tio okazas ĉefe en Usono, ĝis nun ne konata kiel centro de esperantista vivo. Alian agadkampon gravan por ni pritraktis Seán Ó Riain en sia enkonduka prelego. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio raportis pri ties ĉefaj okupoj: informi pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj ĝia kapablo kontribui al multlingveco en Eŭropo – do al deklarita celo de la Eŭropa Unio – kaj pri ĝia ebla kontribuo al la kreiĝo de eŭropa identeco. Ambaŭ temoj rilatigas la internacian lingvon al la aktuala debato pri stato kaj estonteco de la Eŭropa Unio: Esperanto ne staras flanke, sed povas esti parto de la solvo. La avantaĝojn de nia lingvo komencas malkovri ankaŭ interesa celgrupo, pri kiu en Zweibrücken raportis Chuck Smith kaj Charlotte Scherping Larsson: la multlingvuloj, kiuj de kelkaj jaroj kunvenas

en “Polyglot Gatherings”. La fakto ke inter ili 20-30 procentoj jam parolas kaj uzas Esperanton estas bela pruvo ke nia lingvo ne celas anstataŭi aliajn, sed male subtenas multlingvecon kaj lingvan egalrajtecon.

La decida demando por mi post tia evento estas: ĉu valoris la multan laboron, kaj kiel ni nun daŭrigu? Mi foje aŭdis la argumenton ke en la hodiaŭa interreta mondo kongresoj ne plu estas bezonataj (same kiel lokaj grupkunvenoj kaj entute la ekzisto de Esperanto-asocioj). Mi ne konsentas kun tiu argumento: kunvenoj necesas jam pro statutaj kialoj, kaj vivanta lingvo almenaŭ jen kaj jen bezonas esti parolata en la reala mondo. Krome geamikoj volas havi okazon renkontiĝi, kaj kongresoj ĉiam estas bonaj okazoj por atentigi la reston de la mondo ke ni ekzistas, eĉ kreskas. En ideala kazo ni revenas de kongreso kun nova optimismo. Laŭ ĉiuj kriterioj la kongreso en Zweibrücken valoris la penon. Grandan dankon al la LKK kaj ĉiuj aliaj, kiuj ĝin helpis organizi! Kaj ĝis revido post unu jaro proksime al nia norda limo en Neumünster.

Ulrich Brandenburg

DEK JAROJ DE ESPERANTO EN FILOZOFIA FAKULTATO DE ZAGREBO



Dum la vintra semestro de la akademia jaro 2017/18 kiel parto de instruoferto de la elekteblaj kursoj en la Germana fakto de la Filozofia fakultato de la Zagreba Universitato estis instruataj du studobjektoj: planlingvoj kaj interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto. La studobjekto planlingvoj estis instruata en la germana lingvo al 35 bakalaŭraj studentoj de la germana lingvo kaj literaturo. La kroatlingvan studobjekton interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto partoprenis 4

magistraj studentoj de la Filozofia fakultato, kiuj studas aliajn fakojn kaj ne germanan lingvon kaj literaturon.

Ambaŭ kursoj estis simile strukturitaj – en la enkonduka parto estis prezentitaj unuflanke la fenomeno de lingvoinventado el la historia, socilingvistika kaj lingvistika vidpunktoj kaj, aliflanke, interlingvistiko kaj espe-rantologio kiel sciencaj subfakoj de lingvistiko, socilingvistiko kaj aplikita lingvistiko. La dua parto de la kurso estis dediĉita al lernado de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo. Estis uzataj la respektivaj german- kaj kroatlingva Esperanto-lernolibroj.

La ekzameno konstitis el du partoj: skriba kaj buŝa. En la skriba parto la studentoj devis montri iliajn bazajn konojn de elementoj de la Esperanta gramatiko kaj leksiko, dum por la

buŝa parto de la ekzameno ĉiu studento devis prepari kritikan interpretaĵon de iu altnivela scienca interlingvistika artikolo, studo aŭ eĉ libro.



Oni eble menciu ĉi-tie la fakton, ke la studobjekto Planlingvoj estis la unuan fojon instruata en la akademia jaro 2007/2008 kaj Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto en 2008/2009 kadre de tiutempe enkondukitaj novaj studprogramoj kreitaj laŭ la principoj de la tiel-nomata bolonja reformo. Post la dekjara sperto montriĝis, ke la studentoj ĝenerale scivolemas pri la fenomeno de lingvoinventado kaj interesiĝas pri lernado de Esperanto. Kelkfoje okazis, ke ne ĉiuj interesiĝintoj povis esti akceptiaj en la kurso planlingvoj pro – laŭ

la instruedagogiaj kriterioj – limigita nombro de partoprenantoj.

Dum la unuaj jaroj de la instruado de tiuj du studobjektoj oni pli multe okupiĝis pri la teoriaj kaj historiaj aspektoj de planlingvoj kaj interlingvistiko, kio rezultis je manko de instruunuoj por lernado de Esperanto. Pro tiu fakto, dum la lastaj jaroj de la instruado oni pli koncize traktis la teoriajn aspektojn por ke pli da instrutempo restu por okupiĝi pri Esperanto. Pro la specifa strukturo de la studentoj, kiuj kvazaŭ senescepte studas iun filologian fakon kaj havas plurlingvajn kompetencojn, la instruado de Esperanto portis kun si samtempe fruktoplenajn lingvokomparajn diskutojn kaj envidojn.

Por la akademia jaro 2018/19 estas antaŭvidate, ke en la vintra kaj en la somera semestroj estu ofertata la studobjekto Planlingvoj, dum Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto en tiu akademia jaro ne estos instruata. Nome, tiu studobjekto estas instruata nur dum akademiaj jaroj en kiuj la instruisto havas malpli da instrutaskoj en la Germana fako.

Velimir Piškorec

GRANDA VORTARO ANKAŬ POR HUNGAROJ

Post *Grand Dictionnaire* de Gaston Waringhien en 1955 aperis pluraj grandaj vortaroj por diversaj lingvoj (itala 1984 kaj 1996, germana 1999 kaj 2007, hispana 2003, nederlanda 2004, ĉina 2007 kaj 2015, kroata 2008, ĉeĥa 2017), bazitaj sur Plena Vortaro aŭ Plena Ilustrita Vortaro. La hungaroj devis atendi ĝis 2014, kiam aperis la unua eldono de *EHV Esperanta-hungara vortaro* en du volumoj en mia redakto. La plej freŝa estas la tria eldono, aperinta en 2015.

La naskiĝo de la vortaro

La kernon konsistigis vortolisto el ĉ. 1000 eroj. La redaktanto de la elektronika vortarserio *La Vortaro*, B. Vivier petis min kontrollegi vortaron kunkombitan el franca-hungara kaj franca-Esperanta vortolistoj. Ĉar ĝi evidentiĝis absurda misnaskito, mi rekreis la liston surbaze de la Esperanta parto.

Plue ĉi tiun liston mi pliampleksigadis per aldono de novaj elementoj, kolektitaj el miaj legaĵoj, observado de la parola lingvouzo kaj mia traduka praktiko. La ĉefa celo estis

konsistigi tradukistan vortaron por la propra uzo. Dum mia laboro min multe stimulis partopreno en la verkado de la hungara-Esperanta mezgranda vortaro de Szerdahelyi-Koutny kaj la redaktado de la hungara parto de Reta Vortaro (ReVo). Kaj pli malfrue la kompilado de la *Bildvortaro de Esperanto*, kunredaktita kun Petro de Smedt.



La karaktero de la vortaro

La vortaro funkciis ekde eko kaj dum sia disvolviĝo nur en elektronika formo. La diversaj vortarlegaj programoj difinis ĝian ĉiaman strukturon, kiu laŭnecese plurfoje ŝanĝiĝis. Mi ŝuldas dankon al B. Vivier, G. Deák Jahn, G. Bata, J. Sárosi kaj E. d'Hondt, kiuj ebligis per siaj legoprogramoj la rapidan kaj komfortan uzadon de la vortaro.

La prope elektronika karaktero de la vortaro kaj la fakto, ke ĝi pliampleksiĝadis per propra kolektado kaj partopreno en la redaktado de la menciitaj vortaroj sekvigis, ke la vortolisto ne estas produkto de konscia kompilado, ĝi egale entenas elementojn gravajn por averaĝaj legantoj kaj por ili malpli gravajn terminojn, kio ja ne ĝenas en okazo de elektronike uzata vortaro.

La kvanta pliiĝo de la vortaro kaj la postuloj de ĝiaj uzantoj necesigis, post certa tempo, kompari ĝin kun NPIV, kaj surbaze de ĝi korekti kaj kompletigi ĝin. La novredaktado ne sekvis fidele la strukturon de NPIV. Mi konsideris pli celtaŭga organizi la vortartikolojn en jena, por hungaraj uzantoj pli konvena maniero: 1. ĉefvorto, 2. derivaĵoj el la ĉefvorto, 3. kunmetaĵoj kun maldekstra radikvorto, 4. plusendo al kunmetaĵoj kun dekstra radikvorto. Ĉe la malkovro de la signifokampoj helpas pluraj ekzemplaj sintagmoj.

La vortaro celas priskribi la faktan lingvouzon, do ĝi ne pretendas esti normiga. Ĝi ne deziras preni starpunkton en diskutoj pri neologismoj kaj skemismo kontraŭ naturismo. Sed ĝi estas ne tute priskriba, ĉar en certaj okazoj ĝi plusendas al variantoj, konsiderataj kiel normaj aŭ preferindaj.

Laŭ postulo de certa rondo de uzantoj prezentiĝis neceso eldoni la vortaron paperforme. Ĝia novredakto, pli konforma al ties libra karaktero postulus tro grandan laboron, tial la elektronika origino postlasis siajn spurojn sur la papera eldonaĵo. Kompreneble okazis certaj modifoj kompare kun la elektronika formo, ĉefe ĉe la tria eldono, ekz. forlaso de genraj taksonoj, reduktado de specionomoj al bazaj taksonoj, unuvolumigo per tildigo de la radikoj, du-kolumnigo ktp. Ĉi tiuj ŝanĝoj tamen ne tuŝis esence ĝian uzvaloron.

Parametroj

La vortaro havas ĉ. 19 500 kapvortojn. Sub la kapvortoj troviĝas pli ol 40 000 derivaĵoj kaj kunmetaĵoj kun maldekstra radikoj, pli ol 14 000 ekzemplaj sintagmoj, frazeologiaĵoj kaj plusendoj al sinominoj, ĉ. 126 000 rikordoj. Fine de multaj vortonestoj troviĝas plusendoj al kunmetaĵoj kun dekstra radikoj. Tia strukturo ebligas tre profundan studon de la signiferoj de la radikoj. La vortaro disponeblas en diversaj formoj, krom la papera ankaŭ en .exe, .pdf, .mobi kaj .epub: <http://www.vortaro.hu/vortaro.htm>.

Futuro

Surbaze de la kolektita materialo povas esti kreita la hungara-Esperanta versio de la vortaro. I. Kossey inversigis ĝiajn flankojn, kaj surbaze de tiu malnetaĵo povis komenciĝi la redaktado de la hungara-Esperanta vortaro, kiu laŭnature estos multe pli ampleksa. Ankaŭ ĝia strukturo ŝanĝiĝis konforme al la postuloj de la hungara lingvo: kapvorto kaj ekzemplaj sintagmoj kaj necesaj plusendoj. Ĝi pretiĝis ĝis liter J, kiu konsulteblas ĉe la supra ligo. Kiel kromprodukto de la laboroj estas prilaborata kolekto Hungaraj-Esperantaj parolturnoj kaj proverboj, kiu estos eldonita aparte post la finpretigo de la vortaro.

Jozefo Horvath

www.vortaro.hu

LA 17-A NOVJARA RENKONTIĜO (NR)

La 17-a Novjara Renkontiĝo (NR) ĉi-jarfine okazos de la 27-a de decembro 2018 ĝis 3-a de januaro 2019, de ĵaŭdo ĝis ĵaŭdo en Wiesbaden, samtempe kaj samloke kun la 10-a NIS, la programo por junuloj. NR ĉi-foje estos proksime de Frankfurto ĉe Majno. Jen la [informa paĝo](#) kun la [aliĝilo](#).

Aliĝis intertempe jam 72 homoj el ok landoj, 40 el ili el eksterlando, 25 junuloj kaj infanoj. http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr17.php Jen la aliĝilo, <http://esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>. Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj, jen multaj kaŭzoj por veni kaj reveni al NR/NIS... :-). Ĉu vi ŝatos festi kun ni novjare en internacia rondo? Do venu al la venonta NR!

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand

<http://www.esperanto.land>

**LA KVINA PARTO EL LA LIBRO IDENTECOJ
V. IDENTECO KAJ LINGVO**

Identeco estas forto, kiu interligas homojn kaj grupojn baze de emocioj kaj raciaj pripensoj. Helpe de ideologioj (idearo pri la senco de la vivo) oni evoluigas konvinkojn kaj kredojn pri la graveco de grupo al kiu ni apartenas. Tiel ekestas fortegaj emocioj pri interligiteco, pri amo al la siaj, preteco sin oferi por la siaj. Sed la identeco ekzistas pro tio, ke la homoj povu distingi apartenantojn de la propra grupo disde aliaj kaj por tio estas necesaj signoj pri rekono. La ĉefa signo por tio estas lingvo kaj ĉiuj ĝiaj variantoj (idiomoj, dialektoj, slangoj...)

La lingvo estas la nura certa signo kaj samtempe la centra simbolo de nia aparteno kaj ŝajnas ke ĝi estas natura. Sed ĝi ne estas natura, samkiel ĉio rilata al identecoj, ĝi estas ligita al socia ĉirkaŭaĵo. Ni lernas nur tiun lingvon, kiun oni uzas en la ĉirkaŭaĵo en kiu ni vivas, kvankam ni havas potencialojn por ellerni kiun ajn homan lingvon. Lingvo ne estas natura sed socia fenomeno, kiun homoj kreas, difinas, formas kaj decidas pri ties reguloj. Infanoj, kiujn edukis bestoj en ĝangalo konas neniun homan lingvon. Lingvo do estas nur unu el potencialaj lernebloj kaj dependas de la ĉirkaŭaĵo kiujn lingvojn ni lernos. Lingvo, kiel ni kutime ĝin

komprenas (fonetika sinsekvo de sonoj) ne nepre estas tia. Surduloj lernas sensonajn sistemojn de movsignaloj, la skriba lingvo estas ankaŭ alia speco de simbola vidlingvo, Intelekte neevoluintaj homoj uzas diversajn gramatike tre simplajn variantojn de la lingva ĉirkaŭaĵo, kiujn iliaj cerboj kapablas regi kaj ĝin devas lerni ankaŭ homoj kiuj rilatas kun ili. Same estas kun novnaskitaj infanoj. Ilia komenca lingvo estas tre primitiva formo de lingvo, kiu malrapide evoluas kaj sur ĉiu ŝtupo ĝi estas iu nova lingvo kiun paralele kun la infanoj lernas ankaŭ la gepatroj kaj forgesas ĝin kiam la infanoj atingas pli superan ŝtupon. La lingvo do estas ĉefsigno por rekoni aliajn grupojn kaj simbolo por grupa aparteno. Kaj ĉar la simboloj estas senpere ligitaj al emocioj, ofendi lingvon de iu persono signifas ofendi ties kolektivian apartenon.

La lingvo ne estas identeco, sed ĝia ĉefa simbolo.

Ĉar ni ĉiuj estas samtempe anoj de multaj grupoj, ni devas ĉiujn tiujn apartenojn havi ankaŭ signitajn en lingvo. Temas pri variantoj kaj subvariantoj de la sama lingvo kiel dialektoj aŭ slangoj kaj tre diversaj variaĵoj. Ekz. en grupo de amikoj kun kiuj mi vagabondas sur la stratoj de la najbaraĵo mi parolas specifan slangon kiu estas komprenebla ankaŭ de aliaj kunurbanoj, sed sufiĉe diferenca ke laŭ ĝi oni rekonas la grupon al kiu ni apartenas. Laboristoj en fabriko parolas alian lingvaĵon ol la mastroj, por tuj vidigi sian apartenon al socia grupo. Kiam iu iras al la avino en vilaĝo kaj kun ŝi restas kelkajn tagojn, tiu sendube baldaŭ parolos almenaŭ iom da loka dialekto, kiun ĉiuj en la vilaĝo parolas por montri ke ankaŭ li almenaŭ parte apartenas al ili. Kiam naskiĝas infano, la gepatroj parolas kun ĝi en ties simpla, sed sub ilia influo daŭre evoluanta lingvo. En la lernejo oni lernas oficialan norman nacian lingvon (nuntempe multe helpas ankaŭ la publikmedioj kiaj radio kaj televido), kiu estas artefarita produkto kreita de grupo da lingvistoj baze de lingvoj kiujn en la pasinto uzis la plej sukcesaj verkistoj kaj poetoj. En la lernejo oni lernas ankaŭ aliajn normlingvojn (fremdajn) aŭ ties nekompletajn variantojn.

Diferencaj sociaj influoj kaj identecoj influas ankaŭ al la elekto de lingva variaĵo uzata en ĉiu unuopa komunika situacio. Mia gepatra dialekto estis kajkava dialekto el la ĉirkaŭaĵo de Klanjec kaj Zaprešić, de kie devenas miaj gepatroj kaj ĝis la lerneja aĝo mi ne konis la norman kroatan lingvon, kvankam mi naskiĝis en Zagrebo, ĉefurbo de Kroatio, kaj tie daŭre vivis. Tiu dialekto iom post iom ŝanĝiĝis al Zagreba kajkava dialekto kiun parolis homoj en Trešnjevka (parto de Zagrebo). Kiam mi eniris la bazan lernejon, mi havis problemojn kun la oficiala norma ŝtokava kroata lingvo. Kvankam mi estis tre bona lernanto nur en la 7-a klaso, post kiam mi jam tralegis multegajn librojn en la kroata, mi sukcesis distingi inter sonoj (kaj literoj) Č kaj Ć kaj iom post iom lerni uzi la E, JE kaj IJE sistemon en vortoj kiuj havas jat-devenan E-sonon. Sekve la kroata normlingvo por mi estis tre for de mia gepatra lingvo, tute diferenca ol mia hejma zagreba lingvo, kiu ja signis mian centran apartenon, apartenon al mia hejmurbo. Kiam mi venis al Slovenio, mi ellernis la norman slovenan lingvon, kiu ja por mi ne estis komplete fremda ĉar mi denove malkovris vortojn kiujn mi konis en la frua infaneco, ĉar ili troviĝis en mia tiama kajkava dialekto, kiun parolis miaj gepatroj. Sed neniam mi sukcesis regi tiom bone la slovenan kiel la kroatan. Kaj estas interese ke nuntempe mi ne plu povas paroli la kroatan, sen fojfoja enmikso de iu slovena vorto aŭ gramatika formo kaj estas ankaŭ inverse. En mia slovena ĉiam enestas iom da kroataj vortoj kaj gramatikaĵoj. Ne temas pri la t.n. fenomeno de transfero (transporto) sed temas pri alia socia leĝo: en ĉiu uzata lingvo devas enesti almenaŭ iom da lingvaj signaloj kiuj montras ankaŭ viajn aliajn apartenojn pro la lingva rolo rilate la socian identecon. Laŭ mia slovena lingvo ĉiu sloveno rapide konkludas ke mi estas fremdulo (ĉar mi parolas kun eraroj) kaj pro tio ke mi fojfoje uzas kroataĵojn li konstato ke devene mi estas kroato. Sed validas ankaŭ inverse: kiam mi en Kroatio parolas la

kroatan ĉiu kroato tre rapide konstatos ke mi estas kajkava kroato sed ke ankaŭ io slovena troviĝas en mia biografio ĉar mi ne povos eviti fojfoje enĵeti ian slovenan lingvaĵon en mian parolon.

En ĉiu lingvo kiel rimedo por komunikado, sed ankaŭ signo de grupaparteno oni povas trovi elementojn de ĉiuj grupidentecoj de unuopulo. Mi ekz. ellernis Esperanton kaj mi estas membro de Esperanto-movado. Kiam mi parolas Esperanton (kvankam mi konas ĝin tre bone) mi uzas ankaŭ kelkiun sintaksan formon de la kroata lingvo aŭ kelkajn vortojn aŭ esprimojn rekte tradukitajn el la kroata sen konscii ke tio ne estas plene en la spirito de Esperanto. La plimulto da esperantistoj havas en sia Esperanto-parolo almenaŭ minimuman (aŭ tre fortan) fonetikan influon de la gepatra lingvo kaj tiel oni tre rapide povas konstati ĉu iu esperantisto estas polo, franco, ruso, germano aŭ anglo. Sed tio ne ĝenas la komunikadon, sed donas al la lingvo aldonan identecan signon. Oni do tuj scias ke iu estas esperantisto, ĉar li parolas Esperanton, sed ke li estas ankaŭ polo ĉar li en Esperanto havas klarajn polajn rekonilojn. Tiel ni povas diri ke ankaŭ Esperanto havas siajn dialektojn – siajn naciajn subvariaĵojn.

Kiel oni sentas en lingvo apartenon al iu filozofio aŭ religio, kiu estas supernacia kaj ne havas la propran lingvon? Pro la uzata terminologio. Katoliko sendube uzos en kelkaj siaj frazoj vortojn specifajn (terminojn), kiujn li lernis dum sia katolika edukado aŭ li mencias rakontojn el Biblio, kiujn Ĉino aŭ muzulmano ne konas... Do, ne estas necese ke katoliko entute parolu pri la kredo por ke li estu post kelkaj frazoj rekonita laŭreligie pro la uzo de terminoj kiujn alikredantoj ne konas. Aŭ laŭ la salutoj ktp.

Ni povas konkludi ke lingvo havas du samvalorajn rolojn; la komunikan kaj la identecan. Se lingvo estus nur komunikilo (rimedo de racio necesa por atingi laŭeble bonan informtransdonon), tiam jam en la romia tempo oni estus povintaj konstati ke la latina estas la plej valora lingvo por komunikado, ĉar ĝi estis tiom disvastigita kaj do ĉiuj ĉesus paroli multajn malgrandajn lingvojn de popoloj kaj popoloj dise tra la imperio. Sed neniam estis tiel. Lingvoj ja malaperas, estas vero, sed ĉiam denove aperas novaj. Se iu malgranda grupo fizike malaperis (mortis la lasta membro), mortis ilia lingvo. Ne nur ke tio okazas kun lingvoj de etaj grupoj, ni diru lingvo de iu insulo de sur kiu homoj disiris tra la mondo, sed tio konstante okazas al ĉiuj lokaj neskribataj lingvoj kaj dialektoj. Lingvoj sen skribado ne estas fiksitaj, ne havas stabilecon, neniuj scias kiel oni parolis antaŭ unu aŭ du generacioj kaj tiuj lingvoj konstante ŝanĝiĝadas. Mia infana kajkava dialekto de la kroata malaperis kun la morto de miaj gepatroj ĉar ni ne loĝis en ilia naskiĝvilaĝo sed en Zagrebo. Mi komplete forgesis ĝin. Mia kajkava dialekto de Trešnjevka (parto de Zagrebo) uzata en mia juneco nun estas esence alia ol tiam, kvankam ĉe la Zagrebanoj konserviĝis kelkaj bazaj karakterizoj de la kajkava zagreba dialekto. Lingvoj kiuj reprezentis miajn tiamajn identecojn malaperis, ĉar ŝanĝiĝis la konsisto de la loĝantaro, ilia meza eduknivelo, bezonoj ktp. Sed tamen daŭre ekzistas zagreba kajkava lingvaĵo, kiu signas identece zagrebanojn kaj tio estas nova lingvo, kiu ekzistas nur pro la identeca rolo de lingvo.

Kiom gravas la rolo de dialektoj kaj diversaj lingvaj variantoj en identeca senco, mi montros je la propra ekzemplo. Mi estas edukita en la spirito de valoroj toleri kaj akcepti aliulojn, neniam mi estis naciisto kiu malamis aliajn pro iliaj apartenoj. Kiam mi estas en Kroatio mi vivas en kajkava ĉirkaŭaĵo (Turopolje), kie ni ĉiuj uzas iun miksaĵon de la zagreba kajkava dialekto (kaj en la vilaĝoj plurajn diversajn lokajn dialektojn kajkavajn). Dum la lasta jugoslavia milito al Velika Gorica alloĝiĝis granda grupo da hercegovaj kroatoj (militaj elmigrintoj el Bosnio/Hercegovio), kiuj pro sia antaŭa vivmaniero kaj fermiteco por la nova ĉirkaŭaĵo en kiun ili venis, kreis apartajn izolitajn vivinsulojn. Kaj kiam ili iom post iom

ekonomie kaj politike fortiĝis, ili komencis postuli ke ĉi tie en Turopolje oni parolu la »veran« kroatan lingvon (hercegovan), kaj ne tiun kajkavaĵon kiun ili ne komprenas. Tiaj deklaroj eĉ por mia toleremo transiris ĉiun limon. Mi koleriĝis: Vi venis al nia hejmo. Ni akceptis vin kaj nun vi volas detrui nian esencon, vi volas konkeri novan teritorion kaj detrui la praloĝantojn – tiel mi pensis. El tiu ekzemplo ni povas vidi ke la rolo de dialektoj estas defendi regionan kaj lokan grupidentecon pro konkerintencoj de grupoj el aliaj regionoj de la sama nacio.

Samkiel iuj lingvoj malaperas tiel ekestas novaj. La luksemburga lingvo (leceburga), nun oficiala lingvo en Luksemburgo, havas tiun statuson nur de la jaro 1984. En pasintaj jarcentoj temis pri ĝermana dialekto, pri kiu la luksemburga elito hontis, kvankam multaj ĝin parolis hejme. Sed kiam ili atingis sufiĉan ekonomian povon kaj suverenecon, ili komprenis ke ili estas nek germanoj, nek francoj sed luksemburganoj kaj ke ne estas kaŭzo por honti pri sia lingvo. Tial ili ĝin normigis kaj komencis skribi kaj nun ĝi estas unu el oficialaj lingvoj. La samo validas pri ekz. makedona lingvo kiu fariĝis oficiala lingvo post la dua mondmilito, kiam la makedonoj komencis konsciiĝi pri sia nacia identeco, kvankam ilia lingvo estas tre parenca kun la bulgara, sed ne estas la sama kaj tia kia ĝi estas, ĝi estas identeca lingvo de popolo al kiu la suverenecon oni agnoskis relative malfrue. Ekestas konstante kaj spontanee novaj lingvoj. En berlina metroo vivis kelkcent gejunuloj kiuj forkuris de la hejmo kaj estas diversnaciaj: junaj turkoj, kurdoj, italoj, germanoj... Ili evoluigis komplete novan lingvaĵon (miksaĵon inter la germana, turka, kurda...) kiu funkciis kiel komunika rimedo de tiuj homoj vivantaj en apartaj cirkonstancoj kaj por kiuj tiu lingvo reprezentis ankaŭ simbolon de identeco kaj fonton de fiero pri tio ke ili estas io aparta.

Same okazis en Fužine, parto de Ljubljana, kie vivis plimulto da miksitaĵoj (patrino aŭ patro sloveno kaj la alia partnero el iu alia jugoslava parto denaske parolanta serban, kroatan aŭ bosnan lingvon). Tie evoluis miksaĵo inter la slovena dialekto de Ljubljana kaj la bosno-serb-kroata lingvo, kiun oni nomis „ĉefurŝčina“ (ĉefura lingvo). Tio iĝis tre interesa en la momento kiam tiu lingvo iĝis prestiĝa lingvo de tiu kvartalo. Se nuntempe tien alloĝiĝas »pura« slovena familio, ankaŭ ili (ĉefe la pli juna generacio) lernas la ĉefuran, ĉar estas »mojose« paroli ĝin kun aliaj gejunuloj.

Ekzistas tre multaj tiel nomataj piĝin-lingvoj en la mondo, aparte sur insuloj kaj insulgrupoj en la oceanoj. Baze de piĝino ekestinta en 19-a jarcento en iuj partoj de Indonezio kies fundamento estas la malaja lingvo miksitaj kun nederlanda, angla, ĉina... kaj tre simpligita gramatiko ekestis lingvo por interligi ĉiujn indoneziajn insulojn (17.000 insuloj!). Temas pri la nuntempa indonezia lingvo, kiun oni normigis komence de la nova sendependa indonezia ŝtato post la dua mondmilito. Nun ĝi estas oficiala lingvo de Indonezio kaj uzas ĝin ĉiuj indonezianoj paralele kun multaj lokaj kaj insulaj lingvoj (entute 300 milionoj da homoj).

Speciale interesa estas ekzemplo de t.n. serbokroata lingvo. En la 19-a jarcento kunlabore kroataj kaj serbaj lingvistoj kreis komunan normlingvon serbokroata (oficiala nomo en la finaj jardekoj de la aŭstrohungara imperio estis »kroata aŭ serba« lingvo), kiu jam en la komenco de la 20-a jarcento disfalis al du variantoj: la serba (ekava) kaj la kroata (ijekava). Sed oni plu konsideris tion unu lingvo kun du subvariantoj. El la vidpunkto de ĝenerala komunikado oni povas diri ke tio ĝustas, samkiel ĝustas ke la diversaj variaĵoj de la angla lingvo (brita, usona, aŭstralia...) estas variaĵoj de la sama angla lingvo. Kaj tio validis poste dum la daŭro de Jugoslavio en kvar respublikoj: Serbio, Kroatio, Bosnio/Hercegovino kaj Montenegro. Kaj kiam Jugoslavio disfalis kaj sur tiu lingva teritorio ekestis kvar sendependaj ŝtatoj, la lingvo rapide disfalis je diversaj lingvoj. Unue forŝiriĝis la kroata. Mi mem estis surprizita kaj kredis

ke temas pri iuj kapricoj de politikistoj, ĉar ja ne estas saĝa afero ŝanĝi la lingvon. La kroatoj plu restos najbaroj kun bosnianoj, serboj kaj montenegroj kaj kun ili kunlaboros, komercos, rilatos multe pli ol kun aliaj najbaroj kaj popoloj kaj ĉio tio funkcios multe pli malmultekoste se lingvo restos senŝanĝa kaj pli-malpli la sama ol se oni subite komencas krei sufiĉe diferencajn lingvojn. Sed baldaŭ poste la samo okazis en Bosnio/Hercegovino, kie oni ankaŭ komencis enkonduki en la oficialan bosno-hercegovan lingvon malnovajn tradiciajn aŭ turkdevenajn vortojn kaj tiel kreis la trian lingvon videble diversan. Baldaŭ mi konstatis ke novaj lingvaj tendencoj en la serba literaturo iris samdirekten: ŝanĝiĝadis ankaŭ la serba lingvo. La lastaj memstariĝis montenegroj kaj ankaŭ ili nun ŝanĝas sian lingvon kaj komencas ĝin nomi montenegra. El tio mi devis konkludi evidentajn: »Ne temas pri kapricoj de politikistoj, sed pri sociologia leĝo«. Kiam ekestas nova grupo (en tiu kazo 4 novaj ŝtatoj) ankaŭ la lingvo devas ŝanĝiĝi, ĉar ĝi respegulas je la simbola nivelo ke en tiu ĉi ŝtato vivas unu popolo, diferenca de la najbaroj, do ke ĉi tie ne plu vivas jugoslavo, sed kroatoj, serboj... Kaj nun ni vere havas kvar lingvojn. La baza komuna lingva fundamento estas ankoraŭ la sama kaj la ĉiutaga komunikado inter homoj de ĉiuj kvar ŝtatoj okazas senprobleme, sed en la nivelo de fakaj lingvoj ne estas same. Fakaj kaj sciencaj novaj terminoj ege diferenciĝas kaj la fakuloj ĉiam pli malfacile komunikas. Nun ne plu ekzistas komuna lingva akademio kaj komunaj televidaj stacioj. Dum la 20 postmilitaj jaroj la lingvoj ankaŭ sen volo de politikistoj disiris. Oni komprenu la jenon: la kaŭzo ne estas komunika rolo de la lingvo sed la identeca. Kiam ekestis novaj ŝtatoj (grupoj aparte organizitaj) devis ĉiu el tiuj grupoj havi almenaŭ iom diferenca lingvon por havi klaran simbolon de nova identeco. Ne necesas ke okazu granda ŝanĝo, sed estas nepreco ke tiu ŝanĝo kaŭzu tion ke post nur kelkaj eldiritaj frazoj ĉiu konstata al kiu grupo (en tiu kazo ŝtato) la parolanto apartenas. Kompreneble, ekestis problemoj en Bosnio/Hercegovino. Tie vivas serboj, kroatoj kaj bosnoj. La nova ŝtato deziras ke sur la tuta teritorio regu nova suverena ŝtateco, sento de aparteno al tiu ŝtato, kiun signos nova identecolingvo. Sed tieaj kroatoj kaj serboj ne volas tion, ĉar la kroatoj volas paroli la kroatan kiu estas oficiala en Kroatio kaj Serboj volas paroli iun kvinan varianton kiu rilatas al ilia tradicia lingvo gramatike la sama kun la novŝtata lingvo, sed kun multaj serbaj vortoj kaj esprimoj. Ĉu do la nova oficiala lingvo de Bosnio/Hercegovino estos lingvo nur de bosnoj (ĉirkaŭ 40% de la ŝtatanoj)? Kvankam la lingva tradicio subtenas komunan lingvon kun specifaj variaĵoj, ĉar ja ankaŭ bosniaj serboj neniam parolis la serban kiam oni uzas en Serbio kaj same la bosniaj kroatoj neniam parolis la kroatan kiel oni uzas ĝin en Kroatio. Similaj problemoj estas ankaŭ rilate la albanan lingvon en Albanio kaj Kosovo, kiuj nun estas du ŝtatoj kun la sama lingvo. Kompreneble ankaŭ en multaj aliaj ŝtatoj ni renkontas amason de tiusencaj neklaraĵoj kaj ofte seriozaj problemoj. En Aŭstrio nuntempe ekzistas forta konscia movado por krei diferencajn variantojn aŭstran de la germana lingvo. Svisio uzas nekutiman kombinon de alia lingvo kiel komunikilo kaj alia parola lingvo kiel identecigilo. La skriba komunikolingvo lernata en la lernejoj de la svisaj germanoj estas oficiala germana lingvo, sed parola identecolingvo eĉ en parolaj informmedioj (radio, televido) estas ĉefdialekto de svisoj – la zurika lingvo).

Identeca rolo de lingvo en kazo de konflikto inter la komunika kaj identeca funkcio estas pli grava. Ne gravas kiom tio kostas, ne gravas ĉu ni povas interkompreniĝi, gravas ke per lingvo ni daŭre montras ke ni ne estas la samaj kun iuj aliaj.

Fine mi povas konkludi:

Lingvo estas artefarita socia kreaĵo, kiu servas por komunikado kaj samtempe havas simblan identecan rolon. Ni ĉiuj estas multlingvaj, ĉar ni ĉiuj apartenas al multaj diversaj grupoj. Tiuj diversaj lingvoj estas plej ofte variaĵoj de similaj parencaj lingvoj, sed ĉiu unuopulo decidas en ĉiu momento kiun varianton li uzos en kiu medio. Tiusence ni povas diri ke ekzistas

sennombro da lingvoj, ĉar praktike ni uzas ĉiam iun alian varianton depende de grupo en kiu ni komunikas. Kiun variaĵon ni uzos dependas de la identeca faktoro.

Zlatko Tišljár

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de aŭgusto 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Flory Witdoeck, Jozefo Reinvart, Uli Brandenburg, Zlatko Tišljár, Velimir Piškorec, Jozefo Horvath, Lu Wunsch-Rolshoven

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

